

# Novajaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

## TIEL OKAZIS

### HAMA-RONDA VESPERO

\*la 18-a de majo, 17h00-19h00, ĉambro 604

Ni gastigis geedzojn; s-inon Joŝie Kleemann kaj s-ron Dieter Kleemann el Germanio. Ĉeestis entute 16, kaj poste 8 el ili kune vespermanĝis ĉe najbara japanstila restoracio. La gastoj ekparolis de sia konatiĝo; en 1965, okaze de la 50a Universala Kongreso en Tokio, kiam Joŝie estis studento japana kaj Dieter studento germana. Poste Joŝie loĝis en Francio, Dieter en la hejmlando, kaj ili revidis sin en la UK en Hungario, kaj poste poste...



## LEGOKUNVENO

\*la 1-a de junio, 13h00-15h00, ĉambro 701

Kunvenis 5, kiuj legis “Nesenditaj Leteroj el Japanio” de Spomenka Ŝtimec, kaj parolis pri la impreso de la libro. Espereble ni raportos en la venonta numero, ties ĉefan enhavon.

## NIAJ PLANOJ

### HAMA-RONDA VESPERO

\*la 15-a de junio, 17h00-19h00, ĉambro 601

Ni gastigos s-inon SUZUKI Masumi. Ŝi, radseĝa vivanto, faris duafojan mondovojaĝon sur t.n. Paco-ŝipo, kun sia edzo. Ŝi tie gvidis Esperanton aŭ Esperantajn kantojn. (En julio kaj aŭgusto ni ne havos Hama-rondan Vesperon).

### PREZENTO DE SOMERAJ SPERTOJ

\*la 7-a de septembro, 15h00-17h00, ĉambro 604

Ni prezentu nian sperton en la venonta somero (kaj la pasinta printempo)! Via prezento estas atendata!

### ĈE LA REGULA KUNVENEJO

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama, okazas jenaj klasoj.

\*Rudimenta kurso

\*Regulaj Klasoj en sabato: Klaso por legado de “Tra dezerto kaj praarbaro”, Klaso por legado de “Vivo de Lanti” / Jokohama Salono / Daŭriga kurso

\*Regula Klaso en merkredo por legado de “Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj”.



■ Eldonas Doi Hirokaz ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti  
 ■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458  
 ■ Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>  
 ■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

## NOVAĴOJ JOKOHAMAJ

Kio okazis en Jokohamo, la 2-a plej granda urbo en Japanio kun 3,7 milionoj da loĝantoj.

(SIBAYAMA Zyun'iti)

### ĈIUJ EN INFANVARTEJOJ

La urbestro de Jokohamo, s-ino HAYASI Humiko, deklaris komence de aprilo, ke “Ĉiuj enirdezirantoj en infanvartejoj povis ja vizitadi vartejon.” Okulfrapas, ke en japanaj grandurboj, malsufiĉas vartejoj kontraŭ dezirantoj. Jokohamo estis la unua urbo solvinta tiun ĉi problemon, kvankam ĝi malfieris je plej multo da atendidevaj infanoj.

En la japana administra tradicio, nur social-bonfartaj organizoj neprofitocelaj rajtis mastrumi vartejojn, sed la urbo Jokohamo kuraĝis malfermi eblon, ke privataj entreprenoj mastrumu vartejon, kaj tiu municipa politiko efikis bone. La japana ĉefministro ABE Sinzoo laŭdis tiun ĉi sintenon, nomante ĝin eĉ “jokohama sistemo”. Fone de tio kuŝas la problemo, ke la japana popolnombro iom post iom malkreskas, ĉar virinoj ne emas naski, kaj unu el ties kaŭzoj kredeble estas manko de vartejoj.

### POR-AFRIKA KONFERNECO

De la 3-a ĝis la 5-a de junio en Jokohamo okazis TICAD V, nome la 5-a Tokia Internacia Konferenco pri Evoluigo de Afriko. La epiteto “Tokia” devenas de la 1-a konferenco okazinta en Tokio en 1993. Ĉi-foja okazigo en Jokohamo estas signifoplena por jokohamanoj, ĉar oni taksas la urbon kiel mature internacian centron por tiaj eventoj.

Nu, en la konferenco, multaj ŝtatoj afrikaj estas reprezentataj, kaj dume Japanio kaj aliaj evoluintaj landoj parolis por evoluigo. Sed 20 jarojn post la komenco, oni pli aludis al la komuna kresko en industrio kaj komerco, pli ol unuflanka helpo --- tamen tia diro odoras je unuflanka komercemo de la evoluintaj landoj, inter alie Japanio, ke oni pli investu en Afriko.

---



---

## ESEJOJ

---



---

### JAPANISME POR LA RUSOJ (6)

#### notita de Anatolo Gonĉarov



Poste mi aŭdis, ke la afero ĉagrenis ankaŭ lin. Oni diras, ke en la amorafero kaŭzita al edzino aŭ edzo, **perfidanto pli forte brulas ...**

Hans Jasik, or., *Riveroj*, 25, (aŭg. 1999), p. 29.

En la batalkampo mi sopiris, songis tiun inon, vekiĝis kaj ploris **tiom da fojoj, kiom mi ne memoras**. [La rusoj dirus: tiom da fojoj, ke mi eĉ ne memoras]

UEYAMA Masao, or., *Riveroj*, 26, (nov. 1999), p. 59.

Mi celis nur plenumi mian aventuron de la amo. Kaj nun, kiam mia volo atingis la celon, mia brusto **kvietas, kiel marĉo en arbaro ...**

UEYAMA Masao, tr., *Riveroj*, 26, (nov. 1999), p. 68.

Jes, la frazoj marŝas vikle kaj ampasie, rakontante la vivon de Janusz Korczak kaj tiujn de liaj ŝatataj infanoj kaj kolegoj unu post alia senhalte, **glite intersi**, tio nepre devigas vin pensi ion de eposprozo.

Or., *La Voĉo*, 2000, 7, p. 2.

**Mensogi tiel ke la muroj krakas**. [La rusoj: mensogis tiel, ke eĉ la oreloj velkis]

Tr., *La Voĉo*, 7, (eld. Japanio, Osaka), 2000, p. 4.

Ĉar koncerne la “practical English-on” mi fakte neniel progresis, kvankam mi **aŭdadis** dum du jaroj la nacian idiomon de angloj **elfali tra la ruĝaj kaj stretaj lipoj** de la olda Miss ...

MORITA Akira, tr., *La Gazeto*, 91 (dec. 2000), p. 5.

Oriente de Ijajama troviĝas bela monto nomata Turugi (1955 metrojn super la marnivelo). Tie **retas ankaŭ legendoj**. Unu estas, ke iu imperiestro ...

HAGITA Harugo, or., *Kontakto*, 2000, 4, p. 7.

Sur la rivero Sumida estis nube. Li rigardadis la ĉerizujojn de Mukojima el fenestro de veturanta vaporŝipo. La ĉerizarboj, plenaj de floroj, estis en lia okulo **melankoliaj kiel vico da ĉifonoj**.

Tr., *Fonto*, 242, (feb. 2001), p. 14.

(fino)

## BELETRO

## Procesio de s-ro DON (Fabelo)

ドン氏の行刑

verkis OOTA Hiroja  
esperantigis KOYAMA Takesi

S-ro Don tre amas procesion.

Kiam li vidas pli ol 2 homojn, li forte volas fondi procesion.

Se duopo multiĝas al dekopo kaj dekopo multiĝas al centopo, tio fariĝos perfekta procesio. Plue se mil homoj kolektiĝos, ili fondos tre imponan procesion!

“Se la procesio tamen havos mil homojn, ĝi iom konfuziĝos.”

S-ro Don rekonsideras tiel. Pravas! La procesio de ĉirkaŭ cent homoj estas la plej modera kaj ĝi estos konvena por ordoni al partoprenantoj en la procesio. Kompreneble s-ro Don devas stari ĉe la kapo de procesio, ĉar li ne havas honoron fondi la procesion, se li ne realigas ĝin.

Starante ĉe la kapo por cent homoj li piediras sur la marŝa strato kovrita de verda platano en la kvartalo R. Tio estas tre agrabla eĉ nur supozo, ĉu ne?

“Jes. Mi alportigu al ĉiuj cent homoj la malgrandan flagon kun tinkturitaj literoj: Procesio de s-ro Don.”

Supozante tion li ĝojas. Li tuj volas telefoni al flagvendejo kaj mendi po cent ruĝajn flagojn kaj blujajn por havigi ilin al ambaŭ manoj de partoprenantoj...

Sed kie troviĝos la cent homoj? Ĝuante penson pri tio, ke oni iam sekvos lin po unu, s-ro Don piediras sola sur promenejo en trankvila kvartalo R.

S-ro Don tre amas procesion.

Kiam li vidas pli ol 2 homojn, li forte volas fondi procesion.

Kompreneble, eĉ kiam s-ro Don paŝas duope kune kun amiko, li nepre iras antaŭ la amiko. Unuvorte la amiko devas iri vidante la dorson de s-ro Don. Tio estas bagatela kaj maloportuna

por babili pri diversaj aferoj aŭ por pruntepreni fajron de cigaredo, ĉu ne?

Tial la amiko rapidas por repreni malfruiĝon. Kiam li atingis ĉi-apude s-ron Don kiel ŝultro ĉe ŝultro, s-ro Don rapidas surpriziĝante. Do la amiko iom kolere demandas.

“Kial vi tiel rapidas?”

S-ro Don elfumas unuspire cigaredon kaj fiere respondas returnante sin por rigardi sekvanton.

“Ĉar iri sen procesio malgraŭ duopo estas sen plezuro. Se oni komparas duopon kun nur unu, la nombro de partoprenantoj fariĝas almenaŭ duoble.”

Kiam amikoj kolektiĝas kvin aŭ ses, vicigi ilin estas tre malfacile. Sed s-ro Don perforte fondas procesion.

“Se ni vice iras kun amikoj, tio estas stranga kaj stulta kvazaŭ la trajn-ludo de infanoj.”

Dirinte tion unu persono provas malordiĝi la procesion. S-ro Don tiam diras kvazaŭ kolere.

“Ne diru stultaĵon! Laŭ trafika moralo aŭ laŭ polica regulo oni ne rajtas paŝi sur strato triope aŭ kvarope en larĝo. Ne faru kontraŭleĝaĵon. Ĉiuokaze mi estas intima kun poliestro, ĉar ni foje vespermanĝis kune.”

Oni diras, ke amikoj de s-ro Don volas forstreki lian nomon el la amika nomaro, kaj ke antaŭ ĉio kiam oni vidas la dorson de s-ro Don, oni sentas sin malagrabla, kvankam raŭpo ne alkrociĝas sur lia dorso.

S-ro Don tre amas procesion.

Kiam li vidas pli ol 2 homojn, li forte volas fondi procesion.

Tial s-ro Don paŝadas aliĝinte al miloj da homoj, kiuj homsvarmiĝas en la kvartalo B.

“Ho, se tiu ĉi estus procesio!”

S-ro Don elkore domaĝas. Li opinias, ke paŝadi



senprocesie estas senutile, malgraŭ ke multaj homoj kolektiĝas.

“Ĉu vi ne supozas tiel? Eĉ unu paĝo de enciklopedio, se ĝi dispeciĝas po unu, la paĝeroj estas nur paperruboj. Ĉiuokaze la libro devas havi bonorde kovrilon. Se oni neniom broŝuras paperojn, ili tute ne utilas.”

La kvartalo B formas ringvojon. Do se oni paŝadas kun multaj homoj, oni iam revenas al sama loko. La paŝamantoj turniĝas sur la vojo 2 aŭ 3 fojojn.

Paŝante en homamaso s-ro Don returnas sin kaj rigardas ke kelkmil homoj paŝadas unuj post aliaj malantaŭ lia dorso. Do s-ro Don hipotezas ĝin jene.

“Ĉiuokaze, tiu ĉi estas procesio! Kvankam oni ne havas la standardon de la procesio de s-ro Don.”

Kiam li supozas tiel, li tre ĝojas. La hipotezo iam fariĝas ne hipotezo sed certeca realo por li.

“Oh, kiel mirinde, s-ro Don! Tio estas tre mirinda, ke vi estras la admirindan procesion, ĉu ne?”

Sed rigardu ĝin! Eĉ antaŭ s-ro Don kelkmil homoj paŝadas unuj post aliaj.

“Jes, vi pravas. Sed tiu estas la lasta persono de la procesio de s-ro Don! Mia granda procesio ronde cirkulas. Ĉiuokaze tio estas ĝusta, ke mi staras ĉe la kapo de la mirinda procesio.”

S-ro Don konvinkiĝas tiel.

Eĉ se la procesio de s-ro Don interrompiĝas ĉe sia dorso, aŭ eĉ se s-ro Don paŝadas en la lasta de la bonega procesio de la kvartalo B, s-ro Don certe kredas, ke li marŝadas ĉe la kapo de la procesio kaj ke li havas la respondecon kun bonega ĝojo. Jes, s-ro Don vere amas procesion.

Sed kiu diras ke oni ne amas procesion? Kiu ajn neas tre bonan procesion de la kvartalo B?

Rigardu la vizaĝon kun gaja ĝojo de partoprenantoj en la procesio de la kvartalo B, kiuj kredas je sia procesio! Tio ja estas tre bona procesio, ĉu ne? Jes, tamen tio ne estas ĝusta, ke nur s-ro Don estras la bonegan procesion de la kvartalo B.

(fino)



### Pri la aŭtoro OOTA Hiroja

OOTA Hiroja (太田博也) (1917 ~ 2004) naskiĝis en Tokio kaj translokiĝis kun gepatroj kaj travivis sian knabecon en la urbo Jamagata en la gubernio Jamagata. Reveninte al Tokio li komencis verki fabelon rekomendite de verkisto OGAŬA Mimei (小川未明). En 1941 li eldonis la unuan fabelon “Procesio de s-ro Don”. Li ne soldatiĝis pro malsanemo. Sed li estis rekviziita kiel laboristo en mararmea arsenalo Jokosuka por kontraŭmilitulo. Post la 2a mondmilito li verkis “La urbeto Poriko”(1948), “Rakonto pri ges-roj Polkepoto”(1949), “Ludila ventrado” (1955) ktp.

Li konatiĝis kun kristana pacisto KAGAŬA Tojohiko (賀川豊彦) kaj agadis sindoneme por forlasitaj mizeruloj. Li fondis kapabl-dukinstututon privatan por intelektaj malkapabluloj, kaj amikan grupon por ekzekutotoj surbaze de homaj rajtoj, kaj verkis la libron “Vivantaj mortintoj (Ekzekutoto plendas)” (1956).

Kiam mi(小山武) estis kampara neplenaĝulo, mi konatiĝis kun s-ro OOTA, kiu provizore loĝis en nia najbara vilaĝo en la gubernio Saitama. Poste mi vizitis de tempo al tempo dum ĉirkaŭ 50 jaroj kaj mi ricevis tre taŭgajn konsilojn, kiam mi malsaniĝis je tuberkulozo aŭ ŝanĝis novan profesion ktp.

<noto>

- “Procesio de s-ro Don” 「ドン氏の行列」
- “La urbeto Poriko” 「ポリコの町」
- “Rakonto pri ges-roj Polkepoto” 「ポルケポット物語」
- “Ludila ventrado” 「風ぐるま」
- “Vivantaj mortintoj” (Ekzekutoto plendas) 「生きている死者」(死刑囚は訴える)